GISTO, AGO-2004.

G.O.VASKE.
Str.Esperanto, 880
otto@caiweb.com.br
Senpaga legajxo lau ttt-kongrua Esperanto.

PROVOKO

Karaj gelegantoj, permesu al mi iom tikli vin. Chu vi iam pripensis, kiom da tempo (kaj grosxoj) elspezendas, por prezenti chiumonate almenau dupagxan legajxon? Nu, restu trankvilaj, mi ne celas pagigi, por ke vi ricevu GISTOn. Mi celas, per la arigitaj tekstoj, igi vin legi almenau du pagxojn en nia kara lingvo. Kvankam mia Esperanto estas ne chiam perfekta, mi kiel veterano provas altigi vian nivelon em la uzado de Esperanto. Kelkaj, pokaj, eble kuragxas fingromontri miajn mankojn. Al chi tiuj mi petas, ne kritiku sed helpu min pli bone regi la gramatikon. Al chiuj kune mi postulas, kompense de mia klopodo, prezenti legajxon, almenau reagojn kun komentoj pri la temoj prezentitaj. Memoru ke, la pago por homo kiu faras ion sen postuli pagon, meritas diligentan, kritikeman legadon kaj iom da reagoj. Kontraue la verkinto sentas sin jxetita en rubejon, same kiel homo skribinta leteron al amiko au organizajxo sed neniam ricevas respondon. Chiu tiu kiu surpaperigas ion sxatas ekscii la opimion de siaj legantoj kaj tion meritas, chefe tiu kiu ne pagigas sian laboron. Do, ne gxenu vin skribi al mi kelkajn liniojn en chiu sesmonato. Ne timu, Gisto ne publikigos nepetatajn tekstojn. Memtrompojn/erarojn mi komentos private kaj aldonos klarigojn lau mia veterana sperto.

DILIGENTA ELSTARULO

La ceteraj GISTO-legantoj nepre devas pardoni mian entuziasmon kauzatan de nia estimata samideano Ennio(Torres). Kiam al mi sufichas tempo, mi tuj respondas al homoj tiel diligentaj kiel estas li. Tion mi faras responde al lia surpapera letero, plena de acidaj memkritikoj kontrau siaj memtrompoj, eraroj...eraregoj. pro la damnindaj koboldoj. Li lerte kaj bonhumure priskribis kiom li klopodas dum la reviziadoj de siaj tekstoj. Liaj venenaj kaj spritaj komentoj kontrau sin mem ege ridigis min... envere igis min ridegi. Estu trankvila via diligentula mosxto Ennio. Chiuj multe eraradas sed, tial ke ili ne havas vian fortan karakteron, tial ili timas/hontas konfesi sin neperfektaj kaj, pro tiu ili restadas tiaj sed pensas ke ili jam farigxis perfektaj lingvouzantoj. Erari estas homa eco, ili pensas kaj daurigas la vivon negxenate. Domagxo. Ili forgesas ke venontjare okazos testo pri la kapablo montri sin fluaj interparolantoj kun la vizitantoj, dum la BKE en Porto Alegre. Tiam estos bela oportuno por ke la gaucharo povos pruvi sian kapablon facile kompreni kaj komprenigi sin. Lau mi mankas fortostrecho, por ne hontigi la gauchan komunumon. Chu vi almenau parkerigis etan/grandan rimaron/poezion, por maski la laman scion pri Esperanto? – Memoru ke verve, akurate kaj fortavoche recitata poezio elsxutos tondran aplaudon chefe se la punkciado estos rigore observata.. Nur tio jam kalkuligos valorajn poentojn far la auskultantaro. Enniigxu!!

SPRONA ALDONAJXO

Homo plenkonscia ke li/sxi plene regas la lingvon, parolas lautvoche, el plena busxo, kiel faras la italidoj. Ech iliaj brakoj parolas!! Memoru kiel bele parolas, ekzemple nia bonaesperano Grattapaglia, nia valora Zaghetto au nia reelektita UEA-prezidanto Rossetti. Vi certe audis lin, per radio, en Pekino. Jes ja, tamen, por akiri plenan memfidon oni devas bonege respekti almenau kvar angulstonojn: 1) - parkere kaj 100% scii la chefajn

prepoziciojn. 2) - Tuj distingi chu la uzata verbo estas au ne estas transitiva, por gxuste aldoni N-akuzativon au forlasi gxin. 3) – En sia kapo havi sufiche vastan vortaron, por gxuste elekti vortojn, sen misuzi signifojn. 4) – Perfekte scii chiujn korelativajn vortojn. Kiu ne plenumas chi kvar postulojn, ne rajtas nomi sin (bona) esperantisto. Nu, chu vi estas valora samideano au chu vi estas mizera estulo ne kuragxa investi kelkajn horojn da praktikado, por farigxi brila akceptanto de la alvenontaj kongresanoj en la venonta jaro en POA? – Ne forgesu ke multaj el ni devos dejxori ie en gicheto/akceptejo kaj ke, krokodilajxoj identigas neglektan samideanon, chefe dum E-kongreso, la chefurbo de Esperantio.

BALOTADO

Geesperantistoj restadas neutralaj rilate al partia politiko sed, validas memorigi ke ni devas elekti nomojn kiuj favoras chirkaumediajn protektantojn, kun la celo antauzorge postlasi al niaj genepoj spireblan aeron, trinkeblan akvon kaj teron fekundan. Kondamnas ekologistojn nur richaj homoj kun dolarsignoj kiel pupiloj.

PROPONO

De nun ni adoptu jenan proceduron, por veki "vivajn mortintojn" pri nia ekzisto. Mi jam komencis agi. – Chiuj ni legas almenau jxurnalo(j)n kaj revuo(j)n. Ofte oni en anoncoj trovas gramatikajn erarojn. Taktoplene oni skribu al la anoncinto sciigante ke eblaj klientoj/kandidatoj povas malfavore antaujugxi la entreprenon, pro la enhavata eraro. Aldone oni informu ke la lernado de Esperanto igas rezonadi kaj plibonigi sian scion pri la nacia lingvo, ke tio ne tralasos erarojn. Tiam eblas aldoni detalojn pri la facila gramatiko, ke Esperanto celas favori chiujn minoritatajn lingvoj, ktp...

BOMHUMURO. - STRATEGIA ELTURNIGXO

Sur side-stara benko, en drinkejo, viro provas parolan rilaton kun charma blondulino, kiu sidas flanke de li. Li riskas diri:

- Mi preskau certas ke iam ni ie intervidigxis.
- Tre eblas, rediras la belulino. – Mi dejxoras kiel akceptistino en kliniko de veneraj malsanoj.

LBV (Ligo de Brazilaj Bonvoluloj)

Klarigo por nebrazilanoj. LBV, infana vartejo kiu insiste almozpetas, ripetfoje revizitas hejmojn cele replenigi sian kason. – Iam sxipo sinkis en la monato Majo. El la dronintoj postvivis nur milionulo kaj lia edzino. Ili sukcesas nagxi kaj atingi nelogxatan insulon. Du tagojn poste ankorau ne vidigxis signo de savobrigado. La ino panikigxis. La edzo provas trankviligi sxin: trankviligxu karulino, morgau ni forlasos chi insulon.

- Sed, kiumaniere?
- Ne zorgu. Chiujare, fine de majo, mi donacas 500 mil realojn al LBV.
- Ach, chu tio gravas?
- Morgau estos majo tridekunua. Mi vetas ke ili trovos min.

MORFEO GARDU SXIN.

Kuracisto renkontas sian pacienton en nokta amuzejo kaj diras – Aldo! Jam la trian vesperon mi vidas vin gaja chi tie. Diru al mi, kial vi petas min recepti dormigan medikamenton, se vi kvazau logxas en chi tiu ejo?

- Ach, doktoro, vi ne divenis mian duan intencon. La dormigaj piloloj estas por mia edzino.